RADIO HABANA CUBA
Artículo Editado por Maritza Gutierres González
28/01/2016 07:14:12

Raúl Castro, Pepe Mujica kaj Leonel Fernández en la marŝo de la torĉoj.

Kune kun la gestudentoj kaj popolo marŝis la prezidento Raúl Castro, la eksprezidentoj urugvaja Pepe Mujica kaj de dominika respubliko Leonel Fernández en tiu ĉi tradicia marŝo de la torĉoj omaĝe al la nacia heroo de Kubo, José Martí.

Temas pri pilgrimado ekde la ŝtuparo de la Havana Universitato ĝis la Memortabulo al José Martí, kiun tradicie faras la universitatanoj kaj popolo tra la tuta lando ĉiun 27-an de januaro vespere.

La marŝado estis ankaŭ dediĉita ĉi-jare al la 90-a naskiĝtago de la historia gvidanto de la kuba revolucio, Fidel Castro kaj al la VI-a kongreso de la komunista partio, kiu impulsos agadojn kaj pripensadon rilate al la defioj de la kuba popolo por atingi prosperon kiu garantiu la socian stabilecon, kiel esprimis Jennifer Bello, nome de la studentaro, antaŭ ol komenci la marŝadon.

Ĉe la memortabulo de Martí, la kuba prezidento kaj la prezidantino de la federacio de universitataj studentoj, deponis florbukedon kaj dediĉis momenton de omaĝo al la elstara kubano.